Universala Esperanto-Asocio | AKTIVULA MATURIGO | Estrara Subteamo: MOVADO

*EKO 2015-4 sendita al 11an de feb.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## AMO: informado en Tunizio

Ni serioze esploris la eblon okazigi AMO-seminarion en Hamameto, Tunizio, fine de marto okaze de la 8a Mezorienta Esperanto-Kunveno, sed fine rezignis, pro la tro granda perturbo al la ĉefa programo, kaj la maleblo de esperita junulara grupo partopreni la aranĝon. Tamen, UEA planas prezenti tie programojn – kune kun diskutebloj – unu pri UEA, alia pri AMO, cele al iama seminario en la regiono, kiun UEA nomas MONA – Meza Oriento kaj Norda Afriko.

Informoj: http://esperantomovado.blogspot.hu/2014/08/8-mezorienta-esperanto-kunveno.html

## AMO en la itala Internacia Junulara Festivalo (IJF)?

Same tie pluiras intensaj laboroj konstati ĉu eblos en Brusson (paradiza alpa urbetoje alteco de 1300 m. en la Aosta valo) okazigi AMO-seminarion kadre de IJF en pasko (aprilo 1-7). Celatas apartkaraktera seminario, kiu trejnos trejnistojn. Se tio ne funkcios jam tiam (certe iam okazos) povus okazi normala seminario, sed nenio tute certas. Tuj kiam sciebla, ni sciigos vin!  La decidita E-nomo por la urbeto estas Brusono – tre konvena por junulara aranĝo.

Informoj:  http://iej.esperanto.it/ijf/?lang=eo

## AMO en sveda printempo

Tio estas la unua okazonta kaj akceptita seminario por cetero de la jaro, realigota en la 14a kaj 15a de majo, de tagmezo ĝis tagmezo, plentempe tra 24 horoj (kun dormpaŭzeto), tuj antaŭ la Sveda Kongreso de Esperanto, okazonta samloke en Uppsala de la 15a ĝis la 17a de majo. La ĉeftemo estos 'Informado' kun decidoj de la unuopaj temoj farotaj dum plankunsido en marto, tiel ke interesiĝantoj rajtu proponi temojn gravaj por si.

Informoj: http://esperantosverige.se/eventoj/amo-seminario-pri-informado

## Pli da AMO – Afriko, Azio kaj Ameriko

Kiel anoncite, akceptitaj estas AMO-seminarioj en Kinŝaso (DR Kongo) en julio, en Nepalo en septembro kaj en Havano (Kubo) en novembro. El AMO 8 ni ŝuldas al vi raportojn pri la sesioj, kune kun la prezentita materialo – tio sekvos kiam ne plu montos pli urĝaj taskoj.

## AMO-vikio

Ni nun laboras plenigi simplan aron da vikipaĝoj en la retejo de UEA, por ke videblu almenaŭ bazaj informoj pri AMO. Tio realiĝas kadre de pli ampleksa provo starigi vikipaĝaron pri la entuta agado en UEA, laŭ la kvar kategorioj de la Strategia Plano. La AMO-paĝaro evidente apartenas al 'Kapabligo'. Tiuj kiam la projekto atingis akcepteblan nivelon, ni konigos ĝin al vi.

Sekvas kelkaj novaĵetoj, kiuj ne rilatas (rekte) al AMO.

## Virtualaj kunsidoj oftas, eĉ fizikaj okazas

La estraro same en 2015 regule okazigas skajpajn kunsidojn; okazis jam tri, la sekva okazos en la 21a de februaro. La Konsilio skajpos en la posta sabato, la 28an. Intertempe la mastruma teamo plurfoje skajpumis, kaj daŭre faras tion. Foje kun TEJO-estraranoj ni skajpe diskutas komunajn temojn. Se via asocio aŭ vi persone havas temon aŭ proponon por iuj el tiuj kunsidoj, sendu ilin al la plej koncerna estrarano! UEA estos reprezentita en la fizika estrarkunsido de TEJO per sia vic-prezidanto, frue en marto. La fizika kunsido de la estraro de UEA okazos en Roterdamo de la 23a ĝis la 26a de aprilo 2015, kun sabata paŭzo por aktive partopreni en la programo de la Malferma Tago de la CO okazonta en la 25a de aprilo. Kiel kutime, TEJO kaj ILEI rajtas sendi observantojn al la kunsidoj de la Asocio.

## Tria Tutmonda Kolokvo – programo kaj honora komitato

ILEI dissendis inter siaj membroj plej freŝajn informojn pri ĉi tiu grava aranĝo, okazonta en Svislando en majo. Kun konsento de ILEI, ni alkroĉas la dokumenton al niaj kutimaj ricevantoj (eĉ al la ILEI-anaro, ĉar la dissendo nun estas en la eventuale pli oportuna formato: PDF).

## Saluto de UEA al la nova studsesio en Poznano (feb. 2-6)

"Nome de Universala Esperanto-Asocio, mi kore bonvenigas la studentojn por la studsemajno en UAM, kiu malfermas la duan semestron de la nuna studjaro. La nuna trijara programo altiris bonegan kvanton da studentoj; ni estis agrable surprizitaj. Tio atestas ke niaj multaj varbostreboj ne estis vanaj. Mi fidas, ke partoprenos la nunan sesion preskaŭ ĉiujn el la kursaraj komencintoj. Nia komunumo urĝe bezonas pli fortan bandon da aktivuloj aŭ almenaŭ kapabluloj kun solida aro da scioj pri ĉiaj aspektoj de la lingvo. Aparte gravaj estas kreskigo de la aro de trejnitaj instruistoj de kaj pri la lingvo.

Pro la bezono de pli kapablaj agantoj sur aliaj kampoj ol instruado, UEA lanĉis en 2014 sian programo de Aktivula Maturigo kaj jam organizis ok tiajn trejnseminariojn. Pripensu la eblon – suplemente al viaj studoj – partopreni iam en AMO-seminario. Ili ja okazas en kvar kontinentoj, do ne maleblas, ke unu iam okazos proksime al vi!

Studu diligente, ĝuu la kompanion en Poznano, kaj nepre plenumadu la stud-postulojn!"

## Februara revuo survojas – zorgu pri la postaj!

Iuj el vi verŝajne ricevis la februaran revuon *Esperanto*, kiu havas azian emfazon. Por aliaj, ĝi ankoraŭ survojas. Ĉiukaze, la reta versio estas delonge afiŝita. Grava atentigo por tiuj, kiuj ankoraŭ ne abonis ĝin por 2015 aŭ ne kotizis por la nuna jaro en kunrevua kategorio:




**LA FEBRUARA NUMERO ESTAS LA LASTA, KIUN VI RICEVOS!**